

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2009:4


Somero - tempo por renkonti esperantistojn



En Bjelostoko, Pollando

Universala kongreso

En la urbocentro de Bjelostoko troviĝas butikoj de glaciaĵoj. Trans la strato, je la flanko de placeto kie la urbo okazigas muzikajn prezentadojn dum festotagoj, troviĝas kafejo kun la nomo Kafejo Esperanto. Tuj apude estas la strato Zamenhofa, kie Zamenhof naskiĝis. Legu sur p. 4. Fotis: Ulla Luin



En Elsinoro kaj Helsingborgo

Kultura Esperanto-Festivalo 9

Partoprenantoj de la 9-a Kultura Esperanto-Festivalo lernas drumadon de loka majstro (Michael Aaby!) kaj tuj iras al urba placo por montri siajn novajn kapablojn al la loantoj de Helsingør, Danio. Legu sur p. 6.

Fotis: Ann-Louise Åkerlund

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet
ISSN 0014-0694
Septembro 2009 • 97-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm och Olof Pettersson
Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:
EsperantoCentro, Vikingagatan 24, 113 42
Stockholm, tel. 08-34 08 00. sveda@esperanto.se
E-post: esperanto@glocalnet.net
Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm
Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm
Tryck: Al-fab-eto, Skövde
Prenumeration 2009: 200 kr.
Prenumerationsavgift för La Espero ingår i medlem
savgiften.
Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00
E-post: sveda@esperanto.se
Nätsida: www.esperanto.se
Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider
dagtid. Ring i förväg!
Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet
Medlemsavgift 2009:
Direktansluten medlem 200 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar
under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,
Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.
Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Masthuggsliden 1, 413 18 GÖTEBORG
Postgiro: 578-5 Nätsida: www.algonet.se/~eldona
E-post: eldona@telia.com Telefon: 0705-850054.

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,
Nätsida: www.e-g.se E-post: egarden@esperanto.se
Telefon: 0590-309 09

Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Järnvägsgränd 11
961 76 Boden, tel. 0921-123 54
e-post: esperanto@glocalnet.net

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5	30 september	31 oktober
Nr 6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har
brådskande information som måste komma ut
senast ett visst datum bör ta kontakt med redak-
tören i god tid innan.

NI PREZENTAS

Hans Häglund



Kie vi naskiĝis?

Mi naskiĝis en När sur Gotlando. Tial
mi estas denaske När-ano (dialekte:
närk).

Kie vi loĝas?

Mi loĝas en Ludvika en Dalekarlio.

Pri kio vi laboras?

Mi laboras pri transmisio de elektra
potenco, pli precize pri HVDC
(transmisio per alta tensio kaj rekta
kurento).

Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?

Mi ŝatas bicikli survoje sporte kaj
genealogion kaj lokalan historion.
Mi aktiviĝas en Ludvika
Hembygdsförening (esp: region-
folkloro societo: Ĉu bona traduko?
Noto de la redaktoro.)

REDAKCIE

Revuoj kaj interreto

Mia ferio baldaŭ finiĝos. Mi uzas la
lastajn tagojn i.a. por finredakti La
Esperon.

Mi fieras redakti 97-jaran revuon.
La Espero fakte havas ĝuste 97
jarojn. Samtempe mi komprenas ke
paperaj revuoj estonte ne havos
same gravan rolon kiel dum la
prahistorio de Esperanto.

Nun interreto estas eble pli grava
ol revuoj. En www.ipernity.com ni
trovos filmetojn pri Kultura
Esperanto-Festivalo multe pli frue ol
ni povas legi pri ĝi en tiu ĉi revuo.

En www.liberafolio.com ni ĉiam
trovas profesie ĵurnalisman

Ĉu vi havas familion?

Jes edzinon Ingrid kaj du aliloke
studantajn gefilojn.

De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?

Mia instruisto Manfred Stenberg
rakontis pri Esperanto kiam mi estis
16-jara. Mi legis libron (Allas Andra
Språk) kaj biciklis al somerkurso en
Helsingör. Mi ankaŭ aŭdis elsendojn
mallongondajn kaj raportis por
ricevi konfirmokartojn (QSL-kort).
Sed post unu jaro mi malaktiviĝis ĝis
2002 kiam studrondo komencis en
Ludvika kaj Lars Forsman venis por
instrui kaj prelegi publike. Tio
instigis min reaktiviĝi.

Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la Esperanto-movado?

Jes mi estas estrarano de Esperanto-
Gastejo en Lesjöfors.

Kiu estas via preferata libro en Esperanto?

Neokazinta Amo de Lena Karpunina
kaj Gösta Berling de Selma Lagerlöf
(ege fluante tradukita libro de
Stellan Engholm).

Ĉu ekzistas aliaj interesoĵoj pri vi?

Mi ĵus ĝuis mian unuan UK-on en
Bjalistoko. Mi estimis renkontojn
kun kaj helpemon de esperantistoj
dum miaj laborvojaĝoj al Ĉinio,
Aŭstralio, Germanio kaj Neder-
lando. La Jarlibro helpis min trovi
ilin.

Skribe intervjuis: **Leif Nordenstorm**

raportadon pri la Esperanto-
movado.

En www.uea.org ni trovas kata-
logon pri Esperanta liberaturo kaj
ankaŭ multon alian.

En www.esperanto.net/literaturo
ni trovos recenzojn pri orinigala
literaturo de Esperanto.

En www.esperanto.se svedoj povos
trovi informojn pri Esperanto.

En revuo kiel La Espero vi tamen
trovos miksaĵon de ĉio, kaj ankoraŭ
vi povas pli facile legi revuon en iu
ajn loko.

Leif Nordenstorm
Via redaktoro

Datreveno en festa etoso

La tuta urbo celebris la 150an datrevenon de la naskiĝo de ĝia granda filo Ludoviko Lazaro Zamenhof. Esperantoflagoj kaj -flagetoj flirtis laŭ la stratoj, pluraj vendejoj kaj restoracioj bonvenigis siajn klientojn en la internacia lingvo, estis starigitaj trilingvaj (po-la, Esperanta, angla) informtabuloj ĉe gravaj historiaj objektoj kaj konstruaĵoj ...

La kongreso okazis en la Politeknika Altlernejo de Bjalistoko, kun la temo "Krei pacan ponton inter la popoloj": Zamenhof hodiaŭ. Estis tri kunsidoj pri la kongresa temo. La unua havis la titolon "Zamenhof tiam", kaj celis pli bone kompreni Zamenhof en lia historia kunteksto. En la dua kunsido ni diskutis la ideojn de Zamenhof en nuntempa kunteksto kaj la tria temis pri kiel plej bone utiligi la heredaĵon de Zamenhof por la estonteco. Ankaŭ la ĉi-jara Esperantologia Konferenco, aranĝita de CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Problemoj), pritraktis la vivon kaj influon de Zamenhof.

Ne ĉiuj programoj okazis en la Politekniko mem. Ekzemple Akademio Literatura de Esperanto (antaŭe Esperantlingva Verkista Asocio) ofertis prelegojn pri esperanta literaturo en la biblioteko de Bjalistoko, la renoma Bjalistoka Popteatro kaj la Bjalistoka Dramteatro ludis esperantlingvajn spektaklojn,

en kafejo Fama kaj la apuda kinejo okazis artaj vesperoj kaj spektakloj, en parko Planty JoMo kun helpo de Kimo dancigis grandan publikon, babilante en la pola.

Preskaŭ samtempe kiel la UK la Vojevodia Centro pri Kulturanimado en Bjalistoko aranĝis la 2-an Internacian Muzikan, Artan kaj Folkloran Festivalon. Ĝi finiĝis marde vespere per koncerto de la Orkestro kaj Koruso de la Podlaha Operejo kaj Filharmonio en la granda placo. Ili ludis kaj kantis poemojn de William Auld laŭ melodioj de juna pola komponisto Maksym Fedorov (ne esperantisto) kaj la finalon de la 9-a Simfonio de Beethoven kun kvar solistoj.

Vere ŝajnas ke la tuta loĝantaro de la naskiĝurbo de "nia majstro" konscias pri li kaj la graveco de lia verko. Multaj neesperantistoj (ankoraŭ) penis lerni nian lingvon por kanti, ludi teatraĵojn, fari prelegetojn ktp - ekde la urbestro ĝis la gejunuloj de la Bjalistoka Kantstudio, kiuj krom la propra bonega programo tre bele kaj lerte gvidis nin en la kantado de nia himno. Mi ege ĝuis la belan urbon kaj la agrablan etoson dum la tuta semajno.

Ann-Louise Åkerlund

je la spuroj de Zamenhof kaj la tempo kiam li vivis. Li naskiĝis en malalta dometo, kie nun estas kvar-etaĝa loĝdomo. Je la flanko de tiu domo, artisto pentris Zamenhof kvazaŭ sur balkono. Super li kaj sub li estas pentritaj aliaj personoj kun radikoj en la esperanto-movado.



Je la apuda placo, tie kie la juna Zamenhof rimarkis malamikecon inter homoj de diversaj lingvoj, troviĝas monumento pri li. Tute taŭge, en la domo malantaŭ la monumento troviĝas reklamo de instituto pri fremdlingva lernado kaj apude estas ŝildo de optikisto.



La domflanko en Bjalistoko

La urbo Bjalistoko decidis trakti Zamenhof kiel mondfaman personon, kiu naskiĝis en ilia urbo. Tra la centro de la urbo estas preparitaj informtabuloj por turisma promeno



Muziko abundis

Artaj programoj abundis dum la kongreso en Bjalistoko, kaj multaj el ili okazis en urbaj teatroj kaj kafejoj. La kantistoj ŝomart kaj Nataša kun la filino Karina loĝas en Svedio, sed origine devenas el Kazahio. Ili prezentis siajn proprajn kantojn en la granda tendo, kiun oni starigis por la kongreso sur la herbejo de la politeknika universitata institucio. La tendo havis bonan lokon por la kongresanoj, preskaŭ 2.000 personoj.

Ulla Luin
(kiu ankaŭ fotis)



En la serio Internacia Kongresa Universitato (IKU), Otto Prytz el Norvegio parolis pri la utilo kaj uzo de komputiloj por blinduloj. La tekniko multon atingis por blinduloj, sed ofte la solvoj devas esti tute aliaj ol la teknikaj solvoj por vidantoj. Sur la bildo: Otto Prytz kune kun la edzino Pilar Menendes. Fotis: Ulla Luin.

STYRELSENS SPALT

Med förra numret av La Espero distribuerades också espujo.se. Bulletinen delades ut under kongressen i Borlänge och presenterades där av Lennart Svensson från Esperanto-Gården. Jag vill tydliggöra att det inte är Svenska Esperantoförbundet (SEF) som gett ut bulletinen. Lennart Svensson tar upp många viktiga saker i bulletinen och jag vill kommentera några från min personliga synvinkel. Tyvärr upplever jag att bulletinen onödigtvis skuldbelägger många esperantister, men som det står, så är bulletinen provocerande.

Den nuvarande situationen i SEF, med både klubbar och direktmedlemmar och den tillhörande problematiken är ett historiskt arv. Stadgarnas utformning lider av detta eftersom SEF nu får anses som en hybrid mellan förening och förbund. I ett förbund utgörs medlemmarna av föreningar och inte av individuella personer. Idag har SEF även direktmedlemmar, som då inte omfattas av stadgarna, vilket Lennart Svensson riktigt påpekar. Att enkelt omforma stadgarna så att de täcker in denna hybridform är inte enkelt. Det enklaste (byråkratiska) sättet att rätta till vårt problem, vore att inrätta en icke-territoriell klubb/förening där nuvarande direktmedlemmar skulle bli medlemmar och representeras i vanlig ordning vid årsmöte mm. Ett annat sätt är att försöka arbeta vidare med vår hybridform men att utöka direktdemokrati genom att skicka ut frågor till samtliga medlemmar för omröstning. Årsmöte och tillhörande beslut måste dock även i fortsättningen ske i form av en fysisk samling.

Det är viktigt att vi syns. Hur ska andra veta att vi finns och att Esperanto lever om vi inte syns? I samma anda finns ett uppmanande inlägg på Internet på Libera Folio om hur gästade esperantister i Helsingör/Helsingborg syntes på gatorna i samband med Kultura Esperanto Festivalo nu i början på juli. Hur vi ska synas på bästa sätt är givetvis svårt att säga generellt utan måste utformas utifrån faktorer som bestäms lokalt och tids-/resursmässigt. När det gäller Esperanto-Centro, om vi ska ha egen lokal eller hyra in oss på annan plats tillsammans med andra föreningar, finns givetvis både för- och nackdelar. Själv önskar jag att vi har egen lokal så länge vi har möjlighet till det. Jag ser det som en styrka att vi kan visa upp en egen lokal och där vi också har ett stort skyltfönster som vi kan använda för

information. Vi bör givetvis arbeta för ett bättre nyttjande för olika ändamål och även till viss uthyrning.

Hur ska den samlade svenska Eo-rörelsen se ut? Den struktur som vuxit fram under förra seklet är även det ett arv och har sina orsaker. Varje organisation har sitt/sina mål och sin verksamhetsform och de går inte alltid att förena. Från SEF kan vi inte genom egna beslut ändra andra Eo-organisationer. Lika lite kan någon annan styra uppifrån. Jag tror inte det fungerar genom ett enstaka möte och rationellt beslut att få till stånd en optimal lösning. Däremot kan vi försöka påverka på andra sätt. Vi kan ordna samlingar där vi möts från olika organisationer som t ex under årets kongress i Borlänge där samtliga organisationer var inbjudna till ett inledande samtal under styrda former men där vi också träffades under mera informella förhållanden. Genom att samtala med varandra, ser vi utvecklingsmöjligheter och ändrar utifrån de behov som växer fram.

I bulletinen tas också frågan upp om Esperanto-Gården inte duger för våra samlingar. Jag skulle vilja ställa en fråga: vad säger "kundundersökningen"? Om det nu visar sig att färre kommer till E-G måste dess styrelse ta upp frågan och titta på orsakerna. Professionellt har jag arbetat med kvalitetsutveckling i företag under flera år och då talade vi om att kundens outtalade, uttalade och oväntade behov måste tillgodoses. Om inte, så blir man inte nöjd kund. Jag har själv varit gäst på E-G några tillfällen och har inte alltid känt mig helt nöjd. Jag tror det går att utveckla E-G vidare så att både esperantister och icke-esperantister upplever att det är roligt och trivsamt att komma till E-G. Men frågan tillhör E-G:s styrelse.

Konkurrerande kurser? Är det verkligen konkurrens? Jag vill nog helst se det som att det finns ett kompletterande utbud, dels utifrån geografisk spridning men också utifrån innehåll. Vi ska nog inte begränsa kursutbudet, det är inte säkert att det blir fler på de kurser som finns kvar, utan snarare arbeta för att få fram fler varierande kurser/kursorter som kan attrahera deltagare till samtliga. Sverige är stort och jag tycker det är positivt om vi kan skapa underlag på flera orter. Vi kanske istället måste satsa mer på information och marknadsföring, kanske på annat sätt, via andra kanaler och mot andra målgrupper, och fylla kurserna.

Bengt Åradsson
Ordförande för Svenska Esperantoförbundet

DEBATT

Vad vill vi välja - vilka villkor?

Vi är två aktiva kvar på Gården, "veteraner" som varit med från början. Vi konstaterar att Esperanto-Gården nu har fungerat i 13 år, och den har gått runt ekonomiskt hittills. Förstås tack vare generösa gåvor och välvilligt gratisarbete från många.

Kooperativet har varit värd för Kultura Esperanto Festivalo, för internationella ungdomsförbundets (TEJO:s) kongress, för intressanta seminarier och flera SEF-kongresser. Och inte minst egna esperantokurser, 12 sommarkurser med kanske 40-talet esperantister i snitt närvarande. Varje år en barngrupp med framtidens esperantister. Vi träffar ibland utländska esperantister som känner till fem orter i Sverige, Stockholm, Göteborg, Malmö (UK-orter) samt Tyresö och Lesjöfors.

Det har inte alltid gått på räls. Det har uppstått problem, men hittills aldrig något oövervinnerligt.

Nu tror vi att E-G står vid en korsväg. Alla som tror att E-G behövs och gör nytta borde om möjligt samlas och resonera om hur vägen framåt ska se ut.

Och finns det någon som tycker att Gården inte behövs eller inte kan göra nytta, så är den också välkommen att delta i resonemangen.

Det är snart årsmöte. Kom och gör din röst hörd. Den är viktig.

Lennart Svensson och Bengt Nordlöf

ANEKDOTOJ

Multekosta pentristo

Baniko daŭre revas esti pentristo: Mi ŝatus ricevi milionon da eŭroj por miaj pentraĵoj.

Kruko: Viaj artaĵoj estas ja bonaj, Kruk' - sed ne tiom bonaj!

Baniko: Sed mia patrino diras ke ili estas bonEGaj!

Kruko: He ja, sed via patrino estas via patrino.

Baniko: Kion vi celas per tio!?

Eta Joĉjo, kiu aŭskultis kun intereso: He, ŝi ja estas maljuna kaj ne plu bone vidas....

Rompita fingro

Jozefino parolas al eta Joĉjo, kiu ĵus hejmenvenis: Nu, kia estis via klaso pri karateo?

Joĉjo: Ne tiom bona, panjo.

Jozefino: Kial ne?

Joĉjo: Mi rompita fingron.

Jozefino alarmiĝas: Ĉu vere!? Ĉu tio multe doloris?

Jo jo: Mi ne certas.

Jozefino: ??

Joĉjo: Ĝi ne estis mia.

Kallelse - Alvoko

Föreningsstämma - Jarkunveno 2009



Esperanto-Gårdens föreningsstämma hålls på Esperanto-Gården i Lesjöfors, Värmland, **lördagen den 3 oktober 2009** (vecka 40).

Jarkunveno de Esperanto-Gården okazos en Esperanto-Gastejo en Leŝeŝoŝo, Svedujo, sabate la 3-an de oktobro 2009 (semajno 40-a).

Stämmoprogram	Programo de l' jarkunvena semajnofino
Fredag	Vendrede
17-19 Ankomst	Alveno
19-20 Aftonvard	Vespermanĝo
20-21 Rundvandring med tipsfrågor	Lokokona promeno
20-21 Planering av praktiskt arbete för E-G	Preparoj por permana laboro pri la ejo E-G
21-22 Dambastu	Saŭno virina
Lördag	Sabate
8-9 Frukost	Matenmanĝo
9-10 Rundvandring med tipsfrågor	Lokokona promeno
9-10 Förberedande styrelsemöte	Estrara kunsido preparanta jarkunvenon
10-11 Esperantogårdens vänners årsmöte	Jarkunveno de Amikoj de Esperanto-Gastejo
11-12 Föredrag på svenska:	Prelego svede:
UK i Bjälstok och möte med	Universala Kongreso en Bjälstok
Europa-Demokrati-Esperanto.	kaj kunveno de EDE.
<i>Bengt Nordlöf</i>	<i>Benito Nordlöf</i>
12-13 Middag	Tagmanĝo
13-15 Föredrag på esperanto:	Prelego en esperanto:
Tonstäver, naturtoner och sång-	Tonsilaboj, naturaj tonoj kaj
samlingen Norda kantaro.	Norda Kantaro. <i>Martin Strid</i>
<i>Martin Strid</i>	
15 Fika serveras	Teo kaj kafo
15-17 Esperanto-Gårdens årsmöte.	Jarkunveno de Esperanto-Gastejo.
17-19 Sång och musik med <i>Mats</i>	Komuna kantado kaj muziko
<i>Landfors och Gunnar Olsson</i>	kun <i>Mats Landfors kaj Gunnar Olsson</i>
17-19 Konstituerande styrelsemöte och	Estrariĝa kunsido kaj eklaboro
arbetsplanering	
19-20 Aftonvard	Vespermanĝo
20-21 Musik, sång och dans med <i>Mats</i>	Muziko, kantado kaj dancado kun
<i>Landfors, Gunnar Olsson</i>	<i>Mats Landfors, Gunnar Olsson</i>
<i>och Martin Strid</i>	<i>kaj Martin Strid</i>
21-22 Herrbastu	Saŭno vira
Söndag	Dimanĉe
8-9 Frukost	Matenmanĝo
9-12 Tre timmars praktiskt arbete för	Permana laboro pri la ejo de E-G
E-G lett av <i>Martin Strid</i>	sub gvido de <i>Martin Strid</i>
<i>och Lennart Svensson</i>	<i>kaj Lennart Svensson</i>
12-13 Middag	Tagmanĝo
13-16 Avresa	Forveturo

För praktiska upplysningar m.m., se Esperanto-Gårdens hemsida <http://e-g.se> eller ring 0590-309 09. Pri praktikaj informoj k.c., bv rigardu nian retejon <http://e-g.se> aŭ telefonu +46-590-309 09.

Välkommen! - Bonvenon!

Martin Strid
ordförande - prezidanto

NOVELETO

Nov-Jorkaj fantomoj

Ekzistas fantomoj en Nov-Jorko. Mezaĝa virino kun sia juna filo iras tien kaj reen tra la urbo kan demandas pri la vojo al Hotelo Pensilvanio. Multaj Nov-Jorkanoj, kiuj iam aŭdas la rakonton pri la fantomoj, ektimas, ĉar ili malklare ekpensas ke ankaŭ ili iam renkontis la fantomojn, kiuj foje petis helpojn trovi la vojon al la hotelo.

Kiel oni scias ke la du vere estas fantomoj kaj ne ordinara turistoj vizitanta la urbegon? Ekzistas tute klaraj pruvoj. Unue la paro ne obeas la pridemanditon. Kvankam helpemulo montras la vojon, la du ofte iras en la inversan direkton. Aliaj homoj asertas ke la fantomoj pluiras ankoraŭ ne ricevintaj respondon de la pridemandito. Due la duopo portas vestaĵojn, kiuj estis modaj antaŭ kelkdekjaroj. (Kelkaj homoj tamen asertas ke la patrino kaj ŝia filo portas blankajn vestaĵojn, aŭ almenaj vestaĵojn kiuj iel briletas.) Trie ambaŭ ŝvebas iom super la trotuaro. (Pri la tria pruvo atestas tamen nur kelkaj el la homoj, kiuj renkontis la fenomenon.)

Tiu ĉi rakonto dum tridekelkaj jaroj cirkulis inter la urbanoj. Iam temas ankoraŭ pri mezaĝa virino kaj dekelkajara knabo. Aliaj rakontantoj asertas ke la knabo nun maljuniĝis. Nun li estas kvardekjarulo kun jako kaj ĉapo, kiu tiras sian patrinon en rulseĝo. Ankoraŭ validas la aserto ke la du portas aŭ eksmodajn aŭ blankajn vestaĵojn.

Kiuj do estas tiuj ĉi homoj? Gazetartikoloj kaj fontoj de etnografistoj klarigas ke en la 1970-aj jaroj malaperis el la hotelo patrino kun sia filo. Ili lasis patron kaj filinon, kiuj estis iom lacaj post tuttaga promenado inter vidindaĵoj, kaj kiuj tial emis resti por iom televidi. Male, la patrino kaj la filo, tute ne estis lacaj kaj tial decidis ankoraŭfoje esplori kelkajn kvartalojn de la urbo. Kiam ili ne revenis malfrue en la vespero, la patro nervoziĝis kaj petis helpojn de kelkaj kunlaborantoj de la hotelo, kiuj siavice petis al kelkaj stratovendistoj montri la vojon al la erarvagioj, se ili hazarde vidos ilin. Tiatempe la patrino kaj ŝia filo, jam revenis al la hotelo tra flanko pordo. La patro danke partonpetis al la hotelaj kunlaborantoj pro ilia kromlaboro, sed tiuj ne havis tempon disvastigi la novaĵon al la stratvendistoj.

Post tiu vespero la fantomoj vagadas tra Nov-Jorko. Ĉu vi cetere vidis la pluvombrelojn kun ilia bildo? Aŭ la T-ĉemizojn? Mi jes.

Kirasulo

DVD kiu enhavas prelegon de Paul Gubbins

Mendu DoVoDon kun fotaj memoroj de nia Renkontiĝo en Borlänge. La ĉefa ero estas la prelego de Paul Gubbins pri la Langvolanĉilo. La formato estas DVDplusRW. Do eblas aldoni au forpreni erojn. Ĝi kostas 35 kr inkl. afranko.

Sendu la monon al mia konto de Handelsbanken. clearing 6531, konto 103 977 252. Menciuj DVD plus vian antaŭnomon kaj sendu retleteron kun via adreso. Mia retadreso: w.posthuma@esperanto.se

Utställning

På Svenska Esperanto-Kongressen presenterades Hans Dahls utställning, som är mycket välgjord och informativ.


Hans Dahl vill att den ska cirkulera i Sverige med utgångspunkt från Esperanto-Gården och du kan beställa. (Adress på sid. 2.)

Du ansvarar för att utställningen kommer till dig, och om ingen bokar utställningen efter dig så ansvarar du också för att den kommer tillbaka till Esperanto-Gården.

Under sommaren har den visats bl.a. På biblioteken i Lesjöfors, Filipstad, Hällefors, Hagfors och Karlskoga.

Bokgåvor

Kaj Stridell är en av dem som engagerat sig för att överlämna bokgåvor av Esperantoförlagets överskottsböcker till bibliotek. Han har överlämnat böcker bl.a. Till gymnasiet i Hallstahammar och biblioteken på samma ort och i Surahammar.



Kaj Stridell överlämnar böcker till biblioteket i Hallstahammar.




El la movada foiro. Fotis: Wim Posthuma.

Ny broschyr

E@I-gruppen (Edukado ĉe interreto), som står bakom nätkursen "lernu", har startat ett projekt för utgivning av en broschyr om esperanto som ska ges ut på flera språk, bl.a. svenska. Som motor bakom projektet finns Hakan Lundberg.

Den svenska upplagan har tryckts i 1.000 ex, tillsammans med upplagorna på esperanto och slovakiska. Esperantoförbundet bidrar till tryckningen av den svenska upplagan och esperanto-upplagan genom Olle Olssons fond, och arbetsgruppen har fått bidrag även från andra håll till kostnaderna.

Broschyren är på 24 sidor i färg. Mer information hittas på internet: <http://ikso.net/sv/broschuro/>



Esperantoupplagan av broschyren ser ut så här.

SEF en UK

Sveda Esperanto-Federacio partoprenis Movadan Foiron dum la UK la 25an de julio. Por la unua fojo ĉiuj 70 E-organizaĵoj ricevis propran tablon. Kelkaj, kiel nia, ricevis elektron kaj eĉ aliron al intereto. Tial 4 organizaĵoj troviĝis iom flanke kaj ne en la longa vico de tabloj ambaŭflanke en la ĝardena koridoro.

Ann Louse kaj Wim montris la mapon de Svedio kun fotoj de urboj montrante la klubojn. La komputileto "montris" la muzikon de konataj svedaj E-grupoj. Cetere svedaj E-libroj, revuon La Espero ktp.

Wim Posthuma

KEF 2009 en du landoj

La ĉi-jara Kultura Esperanto-Festivalo okazis en la ĝemelaj urboj Elsinoro-Helsingborg 7-12 julio. Partoprenis pli ol cent homoj el diversaj landoj, plejparte eŭropaj sed ankaŭ el Brazilo, Kanado kaj Usono.

La programo konsistis el esperanto-kurso, metiejoj (dancado, kapoejro, hiphop, ridklubo, poezio kun Nicola Ruggiero, prozo kun Sten Johansson), teatraĵoj de Toluza Teatra Trupo, ludoj, artistprezentoj, prelegoj, muzikkvizo, gvidado en Elsinoro kaj Helsingborg, muziko, muziko, muziko ... en plej diversaj stiloj. Amir kaj Espo Despo, Hotel Desperado, Inicialoj dc, Ĵomart kaj Nataša kun Carina, JoMo, Kapriol' (nova nederlanda grupo kiu ludas dancigan popolmuzikon), La Perdita Generacio, Oli kaj Villy (juna duopo el Kopenhago, kiu ludas "mort-jazon"), Martin Wiese kaj la Talpoj, Tone (repisto el Brazilo), Pafklik (repo kaj hiphopo), Junas kaj pli junas (danoj kiuj ludas keltan muzikon). Krome la partoprenantoj mem de la festivalo havis eblecon kontribui al la programo. Montriĝis ke ni havis plurajn talentulojn inter ni.

La dumtaga programo okazis en la urba lernejo Byskolen, en la centro de Elsinoro. Dum la vesperoj la koncertoj estis en la kulturdomo Elværket (La Elektrejo) nur kelkminuta promenado de la KEFejo. Merkrede posttagmeze la tuta festivalo transiris la Sundon por iom esplori Helsingborgon kaj doni publikan koncerton en Folkets Hus. Ĵomart kaj Nataša kun Carina belege ludis kaj kantis en la magnifika centjara salono de la Popola Domo de Helsingborg.

Informado al la amaskomunikiloj rezultis en 2-minuta elsendo en la dana TV2 Lorry kaj artikoloj/artikoletoj en Helsingør Dagblad kaj Helsingborgs Dagblad. Ĵurnalisto el Helsingborg/Landskrona eĉ aliĝis al la esperantokurso por komencantoj.

Sabate la 11-an de julio la festivalanoj post du-hora instruado donis sukcesan drumkoncerton en Axelstov, la granda placo de Elsinoro.

Mi havis la impreson ke la partoprenantoj de Kef9 tre ĝuis la etoson kaj havis bonegan tempon. Ili tre aktivis dancante kaj kunkantante.

Ann-Louise Åkerlund

Ni estas Tangshan-a Esperanto-Asocio. Hodiaŭ ni skribis leteron al vi por unu peto.

Kurantjaro estas 150-a naskiĝtago de Zamenhof, por memori tiun tagon, ni aranĝos ekspozicion en la fino de kurantjaro. Unu parto el la ekspozicio estas ekspozicio de poŝtkartoj kaj uzitajn kovertojn de diverslandoj, sed tre bedaŭrinde ni ne havas poŝtkartojn kaj uzitajn kovertojn de via lando. Ĉu vi povas sendi al ni kelkajn poŝtkartojn kaj uzitajn kovertojn de via lando? Se vi bezonas ion de nia lando, ni povas sendi al vi. Ĉu vi povas helpi nin? Ni atendas vian respondon. Nia adreso estas jene: TEA, P. O. Box 3, Tangshan Hebei, 063000 Ĉinio.

TRA LA MONDO

Respondas ŝtatestro

En junio la Prezidanto de UEA Probal Dasgupta sendis leteron al la brazila, ĉina kaj rusa ŝtatestroj kaj al la barata ĉefministro, kiuj kunvenis kelkajn tagojn pli frue por diskuti pri la monda ekonomia krizo kaj pri pli intensa kunlaboro inter siaj landoj ĝenerale. La gvidantoj de la kvar 'promesaj landoj por la estonteco', laŭ la karakterizo de Dasgupta, diskutis interalie pri kreo de nova valuta sistemo. En sia letero la Prezidanto de UEA atentigis ilin ankaŭ pri la bezono de nova lingva sistemo, kiu ne privilegiu kelkajn landojn, kaj pri Esperanto kiel la lingvo, kiu ebligus ĝin.

Intertempe prof. Dasgupta ricevis la ĉi-suban respondon komisiitan de la brazila prezidento Luiz Inácio Lula da Silva:

*Al Probal Dasgupta,
Prezidanto de Universala
Esperanto-Asocio*

Prezidento Luiz Inácio Lula da Silva taskis nin respondi vian leteron de la 20-a de junio 2009 adresitan al li, por danki pro via zorgo pri la egaleco en internaciaj rilatoj, tiel en la financa kiel en la lingvaj aspektoj.

Ni ŝatus montri al vi nian admiron pro la klopodo, kiun esperantistoj de la tuta mondo entreprenas cele al la disvastigo ĉiam pli granda de Esperanto, lingvo kreita de doktoro Lazaro Zamenhof kiel kontribuado por la interkompreno kaj komprenemo inter la homoj.

Ni scias, ke en la historio de la homaro, estis lingvoj, kiuj enrudigis kiel sekvo de la politika hegemonio, kiel latino, aŭ certgrade la franca kaj poste la angla. Ni deziregas ke, fakte, iun tagon Esperanto povu esti akceptita de plejparto de la nacioj kiel lingvo adoptita por faciligi la komunikadon sen lingvaj privilegioj.

Ni certas, ke Universala Esperanto-Asocio daŭrigos siajn demarŝojn ĉe Unuiĝintaj Nacioj por laŭgrade pligravigi la rolon de Esperanto kiel internacia lingvo. Sekve ni ne vidas necesa pridiskuti la aferon, ĉar ni konsentas pri la valoro de la lingvo disvastigata de via asocio.

*Sincere,
Cláudio Soares Rocha
Direktoro pri Historia
Dokumentado*

Duoble en Herzberg

La 86-a Germana Esperanto-Kongreso kaj la 8-a Eŭropa Esperanto-kongreso okazis samtempe kaj kune la 28-an de majo – 3-a de junio en Herzberg. La bunta programo enhavis prelegojn, kunsidojn, ekskursojn, kursojn, seminariojn, koncertojn, teatran vesperon kaj partoprenon en la tradicia urba festparado. Pli ol 350 esperantistoj el 28 landoj partoprenis.

Inter la kulturaj programoj mi volas menci la 90-minutan teatran spektaklon "Münchhausen – la vera kazo" prezentita de Christoph Frank. Li mem ludis ĉiujn rolojn helpe de pupoj. La tuta prezentado estis tre lerte farita, kvankam bedaŭrinde iom malbone aŭdebla.

Alia interesa programero estis la hungara koruso Szená-Torok, kiu konsistis el parlamentanoj de la hungara parlamento. El Toruno en Pollando venis du grandaj infanaj dancgrupoj kun tre ampleksaj kaj bone prezentitaj programoj.



Sed la plej amuza parto de la kongresa semajno estis laŭ mi la partopreno de la plejmulto de la esperantistoj en la granda urba festparado tra la urbo al la Ĉasista kaj Popola Festo-placo. Ni ĉiuj portis aŭ naciajn flagojn aŭ esperantajn flagojn aŭ verdajn ombrelojn kun la vorto "esperanto", kunportitajn de la Esperanto-Grupo Unterweser en Germanio. Estis tre suna kaj varma dimanĉa posttagmezo, kaj preskaŭ la tuta urba loĝantaro borderis la stratojn. Mi kunsendos kelkajn fotojn de la parado.

Resume, la duobla kongreso havis aspekton de "mini-UK", kaj pro la bunta programo, kaj pro la multnacia partoprenantaro.

Ann-Louise Åkerlund

Burunda kongreso

Esperantistoj el Burundo sukcese okazigis nian duan nacian kongreson de Esperanto en Rumonge. Esperantistoj el ok provincoj de la lando partoprenis la kongreson, eĉ kelkaj membroj de Esperanto-Civito kaj kvin skoltoj estis kun ANEBanoj.

Dum la kongreso, oni laŭte legis bonegajn kaj valoregajn salut kaj gratulleterojn, kiujn eksterlandaj esperantistoj kaj E-asocioj sendis al la kongresanoj aŭ al la asocio. LEA (Liaoning-provinca Esperanto-Asocio, Ĉinio) faris projekton de ĝemeligo inter la du urboj Tieling kaj Rumonge. Esperanto bone evoluas en Burundo, kaj ni ne restas nur en disvastigo de Esperanto, sed samtempe ni turnas nian strategion al apliko de Esperanto.

Nia kongreso finiĝis per la riĉaj enhavoj kaj mi informas ke ni bone kaj enordo trapasis ĉiujn punktojn de la programo. La nacia asocio nun havas novan estraron.

Hasano Ntahonsigaye
Asocio Nacia de Esperanto en
Burundo



Junulara Kongreso

Kun partopreno de pli ol 300 kongresanoj disvolviĝas en en la ĉeĥa urbo Liberec la 65-a Internacia Junulara Kongreso, pri kiu intertempe raportis en sia nova elsendo ankaŭ la germana televido ARD.

Dum IJK kunsidas ankaŭ la Komitato de TEJO, kiu jam traktis la plej gravan punkton de sia tagordo, la elekton de nova Estraro por la dujara periodo 2009-2011. Kiel prezidanto estis reelektita Gregor Hinker el Aŭstrio. Paulína Kožuchová el Slovakio fariĝis ĝenerala sekretario kaj Sergeo Tyrin el Israelo kasisto. Saša Kovjazina el Ukrainio respondos pri informado, Lukaš Zebrowski el Pollando pri IJK kaj kongresoj, kaj Irmina Szustak el Pollando pri landa agado.

LINGVO

Semester - en falsk vän

När semestern är slut börjar terminen – eller?


Ord som är snarlika men har skilda betydelser på olika språk brukar kallas för falska vänner. I synnerhet på amerikansk engelska (men för övrigt även t.ex. norska och danska) betyder ordet semester termin, som i skoltermin. På svenska avses istället ledighet, även om just studerande kanske snarare har lov eller ferier än semester från skolan. Även på esperanto finns ordet semestro, med betydelsen (skol)termin, medan termino betyder term eller fackuttryck. För semester med betydelsen ledighet används på esperanto istället antingen libertempo (som ju närmast kan direktöversättas till 'fritid'), eller ferioj 'ferier'.

Olof Pettersson

RECENZO

Originale kaj pensige

Marvirinstrato. Tim Westover. Noveloj. Prezo 10.80 € ĉe UEA. Lawrenceville, 2009 Literaturo.net 209 paĝoj, 21 cm.



La usonano Tim Westover (1982-) konatiĝis lastatempe per noveloj premiitaj en la Belartaj Konkursoj de UEA (tria premio de prozo en 2005, dua en 2006, unua en 2007). En 2009 aperis *Marvirinstrato*, lia unua novelaro libroforma. Ĝi konsistas el dek ok noveloj kun etoso certagrade fabeleca. La stilo ĝenerale estas simpla, kaj en pluraj noveloj ĉefrolas infanoj. Tamen ĉi tio tute ne estas fabeloj por infanoj, sed plenkresk(ul)aj noveloj kun originala enhavo kaj formo.

En kelkaj el la noveloj aperas filozofie pensigaj demandoj vestitaj kiel rakonto kun fabelaj aŭ leĝere surrealistaj trajtoj. Tio validas ekz. pri *Labirintoj*, kie la rakontanta mio kaptiĝas en spirita labirinto konstruante ĝardenajn labirintojn.

En la plej feliĉaj okazoj, Tim Westover trovas ideojn tre originalajn, surprizajn kaj pensigajn. Tia estas ekz. *Meduzet'*, pri knabino kiu amikiĝas kun ŝvebanta meduzo, El la taglibro pri la okcidenta vojaĝo, pri graciaj kaj glaciaj lunulinoj. En iuj noveloj regas plaĉa sonĝeca etoso, ekz. en *Ruĝvela ŝipo* kaj *Marvirinstrato*. Aliaj plenas de la plej neatenditaj cirkonstancoj, kiel *Enanimigo*, kie homoj renaskiĝas kiel hejmaj mastrumaj aparatoj, kio kaŭzas emociajn problemojn.

La plej ampleksa el la noveloj estas *Tri ruĝaj knabinoj*, inspirita de konata anekdoto pri la deveno de la Esperanta difina artikolo el Zamenhofa sonĝo. Jam la ideo verki novelon sur tiu bazo estas ege originala, sed krome Westover vere sukcesas fari el tiu ideo ion tute propran, kiu interesas kaj fascinas. En tiu novelo fantazio kaj realo,

fabelo kaj ĉiutageco kunfandiĝas en tre sukcesan literaturaron.

Do, en la bonaj momentoj, la krea imagpovo de Westover triumfas. De temp' al tempo tamen la rakontoj ne sukcesas senĉese fiksteni mian intereson. Iufoje lia emo vicigi strangajn kaj fantaziajn detalojn iĝas manio iom teda. Sed verŝajne malsamaj eroj kaptos malsamajn legantojn, do ne facilas precizigi, kion li prefere ellasu.

La du lastaj noveloj estas priesperantistaj satiraĵoj. La unua estas sufiĉe originala, kvankam ĝi primokas kutimajn "verdaĵojn". La dua imitas antaŭparolon kiu panegiras literaturan verkon. Ĝi ne estas same originala, tamen sukcesas kaj celtrafa.

La lingvaĵo de la novelaro estas bona kaj klara.

Sten Johansson



LITERATURA NUMERO

N-ro 6 de *La Espero* tute aŭ parte estos literatura. Tial mi invitas vin sendi anekdotojn, poemojn, rakontojn, novelojn kaj aliajn tekstojn por tiu numero.

Sendu ilin prefere tuj sed plej laste ĝis la 31a de oktobro.

Ankaŭ facillingvaj tekstoj verkitaj por komencantoj estos bonvenaj.

Sendu ilin prefere en elektronika formo al esperanto@glocalnet.net aŭ - se papere - al Leif Nordenstorm, Järnvägsgränd 11, 961 76 Boden, tel. 0921-123 54.

Āntligen i ny upplaga:



Esperanto! Nyckel till det internationella språket har kommit i en ny upplaga. 15 x 10,5 cm. 48 s. Beställ flera till klubben eller för att ge bort till julklapp, 2 ex, 40 kr; 5 ex, 100 kr; 12 ex, 220 kr; 25 ex, 375 kr; 50 ex, 600 kr; 150 ex, 1200 kr.

Dessa priser inkl. porto.

Esperantoförlaget, Masthuggsliden 1, 413 18 Göteborg, eldona@telia.com, 031 - 12 05 94
Information om andra böcker :
www.algonet.se/~eldona